MAISON CULTURELLE DE L'ESPÉRANTO
(société coopérative à caractère culturel)
M.C.E
Siège social : Grésillon – 49150 Saint Martin d'Arcé – France

Téléphone : 02 41 89 10 34
Courriel : kastelo@gresillon.org
CCP : MCE Grésillon
1485.39 P – Nantes
Société civile coopérative de consommation à capital variable
RCS Angers (49) n° 522 621 556

ALVOKO AL KANDIDATIĜO

Por proksimigi ĝin al la sesdekjariĝa festo de Greziljono, okazonta sabaton la 30an de junio 2012,

La **Jarkunveno** de la Kulturdomo de Esperanto okazos

Dimanĉon, la 1an de julio 2012 de la 9a ĝis la 12a

Tiu ĉi Jarkunveno devos renovigi duonon de la Komitato elektita en 2010.

Konforme al la statuto modifita dum la Eksterordinara Membrokunsido, la 10an de marto 2012, la Komitato konsistos el **10 membroj** anstataŭ 12 dum la du antaŭaj jaroj. Sekve de la forpaso de Christian Vacheron kaj la demisio de Lucette Echappé (pro personaj kialoj), la Komitato nuntempe funkcias kun 10 membroj. Ni do difinis, inter la nunaj komitatanoj, 5 eksiĝantojn, tiel ke ni havu ekde nun konstantan nombron je 5 eksiĝontoj ĉiun duan jaron, post la kompleta renovigo okazinta en 2010.

La kvin eksiĝantoj estas:	Restas elektitaj ĝis 2014:
Dominique Baron	Elisabeth Barbay
Denis Serge Clopeau	Xavier Godivier
Georges Comte (Jorgos)	Jannick Huet-Schumann
Bruno Flochon	Espéranto-France
François Lo Jacomo	SAT-Amikaro

Elektokomisiono estas komisiita de la Komitato por ricevi la kandidatiĝojn. Tiu ĉi konsistas el Henri Boyet kaj Elizabeth Dubot (Libnjo): ambaŭ estas societanoj. En unua periodo, **ĝis la 8a de majo 2012**, la kandidatoj devos deklari sian kandidatecon al la Elektokomisiono, prefere rete: aŭ, se ne eblas, helikpoŝte al:

Kulturdomo de Esperanto,
kastelo Grésillon,
49150 St Martin d'Arcé,

baloto@gresillon.org
aŭ elections@gresillon.org

La kandidatoj devos precizigi **telefonnumeron**, ĉe kiu eblos kontakti ilin se necese. Ĉiu kandidato ricevos konfirmon pri ricevado de la kandidatiĝo.

Samtempe, kandidatoj rajtos unuope aŭ plurope verki kaj subskribi projektojn por la estonto de Greziljono kaj sendi ilin al la sama adreso, ankaŭ ĝis la 8a de majo 2012. Tiuj ĉi estu ambaŭlingvaj, kaj ĉiu teksto (franca kaj esperanta) estu maksimume 5000-litera. Ĉiuj ĉi projektoj estos senditaj tuj poste al ĉiuj registritaj kandidatoj. Surbaze de ili, ĉiu kandidato sendu ĝis la **22a de majo** al la elektokomisiono propran sinprezentan tekston (maksimume 1000-litera) kune kun, eventuale, nepre bezonataj informoj pri identeco. Antaŭvideblas telefonvokoj kaj retaj interŝanĝoj, sub kontrolo de la Elektokomisiono. La cirkulero entenanta kaj ĉiujn kandidatiĝojn kaj kunvokadon al la jarkunsido, kiu mem okazos la 1an de Julio 2012, estos tiam pretigata por dissendo komence de junio. La voĉdono okazos perkoresponde, tiel, ke ankaŭ societanoj, kiuj ne povos mem ĉeesti la jarkunvenon, esprimu la propran vidpunkton.